

Ni ne plendu, sed agu! Se vi gajnis pesimisman impreson el la enkonduka artikolo, sciuj, ke ne velkis aktiveco de niaj kluboj kaj aranĝoj de nia asocio: Nur en la tempoperiodo de tri lastaj ĉijaraj kvartaloj estas proponata 34 esperantistaj renkontiĝoj en nia respubliko kaj 12 renkontiĝoj en Slovakio, kaj ĉie vi estos bonvenigataj. Detalajn informojn alportas STARTO, dumonata asocia 32paĝa gazeto. Nekompromisa devo de ĉiu esperantisto estas aboni ĉi tiun nian oficialan ligilon, kie krom planitaj renkontiĝoj vi trovos raportojn el esperantista mondo enlanda kaj eksterlanda, personajn anoncojn, korespondadresojn, kulturajn sciigojn altnivelajn. Tamen en Jílská strato ne plu estas eblo aboni la gazeton. Vi mendu ĝin je la nova adreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio: poŝtkesto 1069, 11121 Praha 1.

(El la oficiala raporto). Januare kunsidis la komitato en Skokovy en la pensiono „ESPERO“ (29412 Žďár u Mnichova Hradiště). Komitatanoj konatiĝis kun tiu ĉi ripozejo, kiu pretas akcepti unuavice esperantistojn. Kvankam privata, ĝi povas kontribui al la societa vivo en Esperantio. La komitatanoj konstatis ĉiuf flankan bonegan nivelon de la pensiono, situanta en alloga regiono kaj varme rekomendas al ĉiuj esperantistoj eluzi eblecon renkontiĝi en ĝi. El la plej gravaj programoj: Pritrakto de eblo aranĝi Universalan kongreson 96 en Prago. - Por loko de librotanisto de ĈEA estis varbita fakulo – samideano Jiří Patera el Praha, kiu jam eklaboris. Pri asociaj korespondaj kursoj zorgos komitatanino Mgr Vlasta Janáková el Trutnov. La komitato kompletigis sian nombron laŭ la statuto – s-anino Květa Hubnová el Praha estas nove nomumita komitatanino, kiun necesas fari en la sidejo de la asocio. Fine la komitato traktis pri malkontentiga agado de lokaj kluboj, kiu laŭ informo de la prezidanto estas nesufiĉa. Kelkaj el ili kunvenadas nur neregule aŭ okaze, kelkaj eĉ tute ne funkcias: la poŝtaĵo revenas pro „nekonata adreso“. La komitatanoj transprenis taskon aktivigi klubojn.

Nenaŝikejme, ale konejme! Jestliže jste získali pesimistický dojem z úvodního článku, vězte že nezvadla aktivita našich klubů i našeho svazu: Jen v období třech posledních letošních čtvrtletí je plánováno 34 esperantských setkání v naší republice a 12 setkání ve slovenské republice a všude budete vítáni. Podrobné informace přináší STARTO, svazový 32stránkový dvouměsíčník. Nekompromisní povinností každého esperantisty je abonování tohoto našeho oficiálního pojítka, kde kromě plánovaných setkání najdete referáty z esperantského světa tuzemského i zahraničního, osobní zprávy na vysoké úrovni. Přesto v Jílské ulici nemůžete časopis abonovat, ale na nové adrese Českého Esperantského Svazu: poštovní schránka 1069, 11121 Praha.

(Z oficiální zprávy). V lednu zasedal výbor ve Skokovech v pensionu „ESPERO“ (29412 Žďár u Mnichova Hradiště). Členové výboru se seznámili s tímto letoviskem, které přijímá především esperantisty. Ačkoliv je soukromé, může přispět společenskému esperantskému životu. Členové výboru konstatovali všestranně výbornou úroveň penzionu, situovanému v přitažlivé krajině a vřele doporučuje všem esperantistům využít možnosti setkávat se v něm. Z nejdůležitějších bodů programu: Projednání možnosti uspořádat Světový kongres 1996 v Praze. - Na místo účetního svazu byl získán odborník – s-ano Jiří Patera z Prahy, který již zahájil práci. O písemné svazové kurzy bude se starat Mgr Vlasta Janáková z Trutnova. Výbor byl doplněn podle statutu – s-anino Květa Hubnová z Prahy byla jmenována novou členkou výboru, která obdržela nesnadnou úlohu, jíž je třeba vykonat v sídle svazu. Nakonec výbor jednal o neuspokojivé aktivitě místních klubů, které podle informace předsedy je nedostatečná. Některé z nich se scházejí jen nepravidelně nebo příležitostně nebo zcela nefungující: zásilky se vrací pro „adresu neznámou“. Členové výboru převzali úlohu kluby aktivizovat.

E-seminario en pensiono ESPERO en Skokovy (el la referaĵo de Informilo – monata gazeto de E-handikapuloj) – 25.IV.-1.V.94. - okazinta en belega regiono de la Ĉeĥa Paradizo kaj en agrabla kaj gastema medio estis akompanata per ĉiela favoro. Nome la tutan semajnon regis varma vetero, kiu pliagrabilis nia restadon kaj obligis (znásobila) bonhumoron de ĉiuj. Ĉiutaga antaŭtagmezaj horoj estis dediĉitaj al ekzercado de E-konversacio en kvin rondetoj, kiujn gvidis J. Rýznarová, Z. Novotná, J. Dubinová, H. Fialová kaj L. Fiala. Posttagmezaj horoj estis por ĉiuj liberaj, uzataj laŭplaĉe aŭ por promeno jen belega ĉirkaŭaĵo, aŭ por amika babilado kaj kafotrinkado ĉe subombrolaj tabletoj sur la pensiona teraso varme kisata per sunradioj. Lunda interkona vespero enkondukita per mallonga bonveniga alparolo kaj prezentado de la rondetgvidantoj far s-ro Vaněček kaj prezidita de s-anino Rýznarová ebligis al ĉiuj ekkoni s-nuj la aliajn. Madra „seno pro gasto“ estis interesa kontokorent de ĉeestantoj kun malnova esperantisto kaj atosekunda de la pensiono ESPERO, MUDr Josef Hradil, kiu parolis pri la spertoj de sia E-vivo, esperantaj kaj hejmaj kontaktoj, ĝojoj eĉ seniluziĝoj, kaj respondis demandojn de aŭskultantoj. Merkrede ekskursis ĉiuj al privata ĉevalbredejo Borčice en proksimeco de la pensiono. Plejparto atingis la lokon post nelonga piediro (pěší chůze), malbone moviĝantajn personojn oni veturigis per aŭtomobilo. Posedanto de la ĉevalbredejo RND-ro Inĝ Radko Lyr, konigis al ni nunan agadon de la bredejo kaj ĉiuj samtempe sekvis ĉevallekzercadon. La bredejo ofertas ĉevalrajdajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj per formo de familia refreŝiĝo. Loĝigo estas certigata en plene ekipitaj tendoj, manĝado rekte en la farmo. La ekskurso tre plaĉis al ĉiuj. Ĵaŭda kaj vendreda projekciado de diapozitivoj el Italio (Rýznarová) kaj Usono (Novotná) estis interesa samkiel amuza posttagmeza konkurso gvidata de s-ano Rýznarová. En vespera amuzprogramo, preparita kolektive, kaptis atenton temperamenta „danco de sorĉistoj“ prezentita de rondetanoj de J. Rýznarová. Ĉe fermtaksado de la seminario parolis ne nur unuopaj rondetgvidantoj, kiuj prijuĝis laboron de siaj rondetanoj, sed ankaŭ la rondetanoj aprezis agadon de siaj gvidantoj. Laŭ tio povis s-ro Vaněček en siaj fermvortoj konstati, ke la seminario plenumis intencojn de organizantoj kaj ĉiuflanke kontentigis la partoprenantojn, kiuj esprimis deziron okazigi similajn kunvenojn regule. Vespere ni ĉeestis muzikan kunvenon de „Naturamikoj“ kiuj dumtage alveturis. Programon plenigis magiisto (Rýznar) kaj projekciado de diapozitivoj (Sládeček). Sabate en antaŭtagmeza kunveno oni informis pri diversaj E-aranĝoj, s-ano Vaněček prelegis pri agado kaj celoj de Asocio de Esp. Handikapuloj kaj poste prezentis sin danc-kaj kanthoro el Jablonec nN kun unuhora ĉarma programo, en kiu ludis ankaŭ infanoj. Posttagmeze okazis diversaj ekskursoj, vespere tendarfajro, kies programon prizorgis ĉeestantoj. Gitarludis kaj amason da kantoj eĉ originalaj kantis senlaca propagandisto kaj kantisto Vlado Sládeček. Dimanĉa mateno kaj antaŭtagmezo estis bedaŭrinde tempo de adiaŭo. Ĉio havas sian finon – de longe restos enskribita en nian memoron. JV.

Vuk Echtner (1905-1994) mortis fine de januaro en Domažlice. Lerninte E-on 7-jara, li aktivis en la movado ekde 1920. En 1927 kunorganizis la internacian konferencon: „Paco por lernejo“ en Prago. En la 30-aj jaroj li gvidis la junularan kaj lingvan komisionojn de la landa E-asocio. Post la dua mondmilito li instruis E-on en someraj tendaroj. Pro sia kunlaboro kun E-bahaanoj kaj kun UEA („pro malamika agado“) li estis enkancerigita en 1956, kaj amnesiita nur en 1960. Post junaĝa konatiĝo kun Eroŝenko, Echtner pleje aktivis en organizaĵoj por blinduloj. De 1930 li gvidis la Internacian Blindulaferan Informejon kaj statistikejon, redaktis la brajlan E-revuon Aŭroro dum 47 jaroj (1928-1975), gvidis E-kursojn, pretigis brajlan E-ĉeĥan vortaron kaj transskribis por nevidantoj 52 lernolibrojn pri diversaj fremdlingvoj. E. Tradukis por Ĉeĥoslovakia Antologio (1935) kaj kuneditoris Historio de la E-movado en Ĉeĥoslovakio (1982) de Stanislav Kamarýt. Distingita por la plej alta honormedalo de la ĉeĥa blindularo, Echtner estis honora membro de Ĉeĥa E-asocio, kiu lin proponis en novembro 1993, por Honora membro de UEA.

For fumon! Georgo Rada, delegito de UEA, Rybalkova 1029, blok 645, CZ 43401 Most proponas fondi E-asocion de nefumantoj por batali kontraŭ la fumado kaj protekti rajtojn de nefumantoj. Gesamideanoj, favorantaj tiun ĉi ideon estas petataj skribi al lia adreso.

Pryč s kouřením! Georgo Rada, delegito de UEA, Rybalkova 1029, blok 645, CZ 43401 Most navrhujе založit E-svaz pro nekuřáky pro boj proti kouření a ochraně práv nekuřákům. Samideáni – příznivci této myšlenky se prosí psát ne jeho adresu.

Kalendaro 1994 en Esperanto 3/94 alportas indikojn pri pli ol 200 eŭropaj kaj tutmondaj E-renkontiĝoj, kiuj atestas pri tio, ke la E-movado entute ne velkas, sed havas kondiĉojn por disvolviĝi. Ĉu vi scias pri – krom la tendaro en Lančov kaj Herbotice – pri: Junularaj E-kursoj 7.-14.VIII en Prago – organizas Ĉeĥa, germana kaj nederlanda E-socioj. Temas pri kursoj por komencantoj en la tri nomitaj lingvoj kaj unu kurso por progresintoj en Esperanto. Detalan informon donos la junulara sekcio de ĈEA.

TEJO-Seminario 29.X.-5.XI. Esperantlingva pri la temo: „Regiona kunlaboro en Eŭropo – ĉu motoro por la eŭropa intergriga procezo? Informoj: Lucie Karešová, Tylova 1262, CZ 50801 Hořice v Podkrk.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto, Erich Dieter Krause, Leipzig, Langenscheddt 1993, 2-a reviziita eldono, 40000 serĉvortoj. Unu el la plej kompletaj leksikologiaj verkoj en E-n, 58,80 gld.

Kompletige al la lernolibro. Bernard Golden, Debrecen. 1990, 70p, 21 cm. 25 artikoloj aperintaj en 22 revuoj, pri lingvaj demandoj, 12 gld.

Vendoj de libroj en UEA Rotterdam: Sume indikoj al la jaro 1993. 28 novaj titoloj. La plej vendataj titoloj laŭvice: Pasporta servo; Fantazioj kaj faktoj. M.Boulton; Gerda malaperis. C.Piron; De vilaĝo al urbo. G.Kolffi; Saluton! A.Childs-Mee. - Al nova internacia lingvopolitiko. E-dokumento de E.Symoens. - Esperantaj sinonimoj J.Ojalo. - Winnie-la-Pu. A.A.Milne. - Originala E-a bildvortaro. S.Chaves. - Nova 4-a krestomatío, red.W.Auld. Proverbaro E-a. L.L.Zamenhof. - Plene Analiza Gramatiko de E-o. - kaj multaj aliaj.

Harald Schicke, Im Heidewinkel 45, D-21271 Asendorf, Germanio sukcesis eldoni kelkajn librojn pri medicina temo en sia eldonejo MZ-Verlag. Li atendas kunlaborantojn.

Du belajn renkotiĝojn en Slovakio vi povas pratopreni:

SEL 94 (Slovaka Esperanta Lernejo – en Poprad – dua periodo 7.-20.VIII. laŭ lingvoscio kategorioj A (komencantoj), B-konsultiĝoj por la partoprenantoj de la korespondaj kursoj, - C kurso por progresintoj, D-seminario por aktivistoj). Prezo 2257 Sk por membroj de la ĉeĥa asocio senrabate 2640.-

TUSE – dua etapo 20.-26.8.94 turisma semajno en Poprad kun riĉa ĉiutaga programo miksita per aŭtobusekskursoj. Partoprenontojn gvidos spertaj akompanantoj. Loĝado diverskategoria en prezoj de 18 DEM ĝis 42 DEM. Kontakta adreso: Orientslovakia Regiona Esperanto-Komitato, oficejo en Esperanto-Domo, Sobotské nám.36, 05801 Poprad tel 09232419.

RAPORTO pri la 1-a Interreligia seminario en Tábor. Laŭ iniciato de s-ano Jiří Laŭbe el Roudnice kaj geedzoj Dvořákovi el Prago estis organizita la supre nomita seminario kun ĉirkaŭ 40 partoprenintoj el 8 landoj. Inter ili estis anoj de kvakerismo, bahaismo, taoismo, krom aliaj protestantoj kaj katolikoj kaj pluraj nealiĝintaj. La partoprenantoj aŭskultis eĉ mesaĝon de la praga ĉefepiskopo (iama aktiva esperantisto) kaj episkopo el Hradec Králové (favoranto de Eo). En frata medio prezentiĝis diversaj tezoj, kiuj klarigis principojn de la religioj, sen kvereloj en firma kredo, ke la religioj sukcese aplikos moralajn principoj por bari disvastigon de senbridaj pasioj kaj krimeco precipe de la junularo. Estis decidiĝite aranĝi la estontan seminarion en Budapeŝto dum paskaj tagoj 1995.

Ing Miroslav Havránek Leškova 16, S 81104 serĉas sanitaran mezlernejon, ku pretus kunlabori en kadro de Skolta Esperanto Ligo kun samcela grupo da studentinoj en Bratislava. Li afable al Vi sendos pluajn informojn.

Nova Esperanto-ĉeĥa-germana vortaro kun matematikaj terminoj, 184 p, Hulvácká ulice 18, Drahomír Kočvara sendas kontraŭ 34 Kč. Aŭtoro inĝeniero Jan Verner.



La plej ofta ... **Eventoj** – Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj! Aperas dusemajne, legate en pli ol 40 landoj... Petu senpagon provkzempleron de: LINGVO-Studio, pk 87, H-1675 Budapest, Hungario

Ĝi alportas la plej freŝajn informojn el la esperantista mondo. Abonu ĉe ing. Vladimír Dvořák, Ostravská 637, 19900 Praha 9 kontraŭ 360 Kč jare. Vi ne bedaŭros, se vi helpos vivteni la kvalitan E-gazeton, profesia redaktata kaj ŝatata de multaj gesamideanoj en la tuta mondo.

Esperantista humoristo jubileas. RAYMUND SCHWARZ 100 jara. Laŭ artikolo en la gazeto Esperanto. “popolo, kiu ne kuraĝas moki pri si mem, ne estas matura,” Tion ŝatis diri Raymund Schwarz. Popolo ankaŭ ne estas matura, se ĝi ne konas siajn grandulojn, ni povus aldoni. Tial ni omaĝas (vzpomínáme někoho) la 100-jara naskiĝdatrevenon de nia fama verkisto. Li naskiĝis la 8-an de aprilo 1894 en Metz tiam germana, nun franca urbo.

La familio parolis france, sed la deviga germanlingva instruado faris el Raymond „perfektan“ dulingvulon. Li krome baze studis la latinan, grekan, hispanan kaj italan – antaŭ ol, probable en la j. 1910, aĉetis lernolibron de Esperanto. En 1911 li veturis al Barcelona por testi sian lingvoscion kaj baldaŭ fondis Amikan Rondon en Metz kaj en 1911-1913 publikigis siajn unuajn poemojn. Private li estis altranga banka oficisto, ĉiam seriozege aspektata. Humuron li elsuĉis en la medio de parizaj kabaretoj de dudekaj jaroj. Poste sekvis serio de liaj montkonataj verkoj: revuo Pirato, Verdkata testamento, romanego Kiel akvo en rivero, „... kun siaspeca spico!“ Per vortludoj, kiujn enhavas liaj verkoj, li celis altigi lingvan nivelon de la leganto. Liaj verkoj estas plenaj de satiraj kaj mokaj spritaĵoj laŭ jena: „Estas gazetoj, kiuj vekas abomenon ... kaj aliaj, kiuj vekas abomenon.“ Novaj eldonoj de liaj verkoj eĉ post lia morto en la j. 1973 atestas pri populareco de sia aŭtoro, kiu havas sian forman lokon en E-literaturo.

Plíšek Miloš, el Mladá Boleslav, oferema esperantisto, mortis la 3an de decembro 1993. Li estis ĥora kantisto, partoprenis en multaj esp. renkontiĝoj, ĉiam fidele defendis esperanton, korespondkontaktojn tenis daŭre kun Hispanio. Li tre mankos en niaj vicoj! Li estis nur 67jaraĝa.

S-ano Zdeněk Řezáč el Tanvald suferis grandan malfeliĉon. Lia dometo dum li malĉeesto estis totale elrabita kaj pro tio li perdis kontaktojn kaj adresojn de siaj lernantoj. Malrapide li rekonstruas siajn aĵojn kaj la potempnan rifuĝejon li trovis ĉe sinjorino Morávková 46845 Velké Hamry II, Nro 445. Per bildkarto vi certe konsolos lin!

Ankaŭ lia amiko, longjara samideano Evžen Belda, 46815 Tanvald, Šumburk n.Des 314, transloĝos al la hejmo por rentistoj, kaj disdonas senpage tutajn jarkolektojn de belaj E-gazetoj. Se vi volas havi ilin, skribu rekte al lia adreso.

Al la rivereto. („Holka modrooká ...“) Nacia kanto. Tradukis Miloš Lukáš.

Al la rivereto, bluokula knabineto, al la rivereto, ne iradu plu! Raba akvo vin forportus, kaj domaĝe se vi mortus, al la rivereto ne iradu plu!	Al la rivereto, bluokula knabineto, al la rivereto ne iradu plu! En la akvo de riveroj, vin embuskas mil danĝeroj, al la rivereto ne iradu plu!
--	---

Al la rivereto, bluokula knabineto,
al la rivereto ne iradu plu!
Arbaristo tien venos,
florkroneton vian prenos,
al la rivereto ne iradu plu!

Apud la ĝardeno. („Na tom pražským mostě“ ... trad. Miloš Lukáš).

Apud la ĝardeno kreskas rozmareno /:se ĝi velkus pro sekeco, trafus min ĉagreno./	Se mi tien iros, ĉiuj homoj miros; /:mir surverŝos ĝin per akvo, Poste ĝis deŝiros:/
--	---

Prave uzu prepoziciojn! Užívejte správně předložek!

D U M - I. Prepozicio montranta: I. tempon, en kies daŭro io okazas: forĝu ferdumon, dum ĝi estas varmega; fleksu arbon dum ĝia juneco; dum la parolado li dormis. - II. Subfunkcio: vi iros, dum mi restos; edziĝu dum vi estas juna; E-o bone vivas, dum Volapük ja longe estas mortinta. - III. Prefikse uzata: dumviva membro, dumviva rento, dumnokta promeno. IV. Vortero memstare uzata: Duma = samtempa, provizora, intertempa, ĝisa. DUMe – adverbio: Intertempa, dum tiu tempo; ili sin pretigis, ni dume babilis. - Provizore, ĝise: ni dume lasu la demandon flanke; akcepti dume la lingvon en ĝia nuna formo; kontraste kun tio: kontraŭe: li ne havis praktikajn spertojn, dume en la teorio li ŝajnis al mi tute bona.

Lastamomente: Post la unua Konferenco de Eŭroregiono Nisa (esperanta sekcio) la 23.IV.94 (fonda kunveno kun partopreno de gastoj el Germanio kaj Pollandoj) okazis la 2an de julio la dua konferenco samtema. Sukcese venis raportisto doc.Dr Zemlička el Radio Svobodná Evropa kaj faris raportajon por la rubriko Hlasy a ohlasy. Post longa tempo oni denove sukcesis fari bonan propagandon por Esperanto!

KIEL DiRi? Praktika esperanta frazeologio de Lentaïna.

Temo KONGRESO – daŭrigo:

Prezenti proponon en taŭga formo. Tiu propono akiris ĉies aprobon (souhlas). Oni devas disigi (rozdělit) tiujn du problemojn. Ĉiu ano disponas unu voĉon. Voĉdonado (hlasování) per aplaŭdoj, per sideo-staro; per kartlevo (zvednutí karty); per manlevo; per koloraj globoj, per sekretaj balotiloj. Mi rajtigas vin voĉdoni en mia nomo. La forestanto (nepřítomný) estas ĉiam malprava. Sin deteni (zdržet se hlasování). - Resolucio akceptita unuanime. Per aklamo, senopone, post longa marĉandado (handrkování). Disciplina cedo (ústupek) de malplimulto al plimulto. Proponi, voĉdoni. Forĵeti resolucion. Oni elektis lin kiel prezidanton (=oni elektis lin prezidanto). Ŝarĝo peza sed honoriga. Honora prezidanto. Preni sur la ŝultrojn tiom da respondeco. Havi sur si tre grandan moralan respondecon. Ektondras tempesto (bouře) de aplaŭdoj. Neĉesema (nepřetržitý) aplaŭdo. Ovacio. Fermi la kongreson. Brilanta sukceso. Brila aranĝo de la kongreso. Ĝi povas esti kalkulata kiel la plej grava el ĉiuj kongresoj. Provizi la gazetaron per informoj pri la kongreso. La malfermo de la kongreso estis disaŭdigata de la nacia sendostacio. Konferenco. Kolokvo. Simpozio. Seminario.

Temo: K O R P O . Kapo; vango(ret); mentono (brada); frunto (ĉelo); barbo; nazo; okulo; brovo; orelo; buŝo; lango; lipo; kiso; dento; vizaĵo (obličej); mieno; dorso; flanko; kolo, gorĝo; ŝultro (rameno); kokso (kyčel); vertebraro (páteř) koro; sango; haŭto (kůže); haroj (vlasy); sensoj. - korpĉekorpa homdenseco; svarmo da homoj; Fendi la bruantan amason. Bori al vi la vojjon per kubutoj (lokty). Senatente kunpuŝiĝi kun iu. Korpulenta. Dikventra. Graskorpa. Talio (linie). - kapo: bela, sencerba, leona, kalva, klinita. Kapon ŝanceli (kývat), levi, mallevi, turni, balanci, skui. Jese balanci la kapon (pokyvovat). Nee skui la kapon (zavrtět). Agi laŭ sia kapo. Frapi per la kapo kontraŭ la muro. Kun la kapo klinita malantaŭen. Rigardi iun de la kapo ĝis la piedoj. Kalkuli en la kapo.

KORESPONDI DEZIRAS (malongiloj – zkratky: bk=bildkartoj; ĉt=ĉiuj temoj; d=deziras; i=interŝanĝi; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; pm=poŝtmarkoj; s-ano=samideano; s=sinjoro; tm=tutmonde).

Kouablan International Co ltd.P.O.Box 3445, Acra, Ganaoteletekso 2775 Raybeg propona komercadon. Importas, eksportas, reprezentas, peras.

Fu Guoging, Dianjichang, 10 Chejian, Heilongi jang, Harbin Ĉinio, komercisto de filatelaĵoj proponas servojn kaj serĉas kontaktojn.

D-ro Bwege-Mutabika A. Kaj D-ro Nsambimana Bizagwira V, c/o Bangirahe, POB 172, Gisenyi, Rwanda (Ruando) du bestkuracistoj d kor pri fakaĵoj.

E-instruistinoj vizitontaj Singapuron bv. kontakti la A-Asocion Singapuro por instrui kurson. Tanjong Pagar, P.O.Box 0634, Singapore 9108. Senpaga gastigado por 7-10 tagoj.

Centre Esperanto, Courtil 1CA, F-25000 Besancon – dez k tm

D-ro Juan M.Ramirez Figueroa, E.Pallma 324, Casa Blanca, CP-19110 tm kor

John Dale, 5613 Leesburg Pike, +17, Falls Church, Virginia, USA 22041 emigranta advokato malmulte helpas al vi, se vi helpas la usonan movadon.

110 lernantoj inter 6 – 10 jj, sub gvido de instruistino Jackson L., d kor: Winfiled Scott Elem. School, 10th kaj Eddy St. Ft Scott, KS 66701, US

Krystina Michalska, Witkovo, PL 87-140 Chelmza, Polio, 16jj deziras kor.

Vadim Čajkin, Pk 124, UKR 326520 Cjurupinsk 1, 21j fraŭlo d kor pri okultismo, magio, jogo, filosofio, muziko, vojaĝado.

Iara Balieiro de Alimeida, Rua Trojano Garcia, 263 Cohab III BR-14160000 Sertaozinho, Sao-Paolo, Brazilio 14j tm

Rosana Pires de Souza, Rua S.Ponton 614, BR 140060-790 Ribeirao Preto S.P.Brazilio, 27j oficistino kaj studentino de biologio, d kor tm

Pierre Cabaro, Rue Claude Thiron, F-37000 Tours, Francio, 44j komencanto instruisto pri biologio kaj geologio, d kor pri naturo, historio, fotado.

Genevieve Collignon, 7 rue Jeanne d Arc, F 37100 Tours, Francio, 50j komencantino, interesiĝas pri naturo, legado, sporto, d kor tm

Margaret Adick, 52j komencantino, Kaiser Friedrich-Str.163, D-41769, Duisbur, Germanio d kor tm

Marcello Varandas, pk 41, Juiz de fora, MG BR-36001-970, Brazilio, 26j fraŭlo, ŝatas interŝanĝi diskojn.

Annamaria de Almeida, rua Erederioco Dalmaso, 769, Jardim Alvorad, BR 14160-000 Sertaozinho Sao Paolo, Brazilio, 12j lernantino, d kor tm.

Ifj.Csóka József, Petöfi u.9, H-4164 Bakonszeg, serĉar korespondpartneron, kiu volas ion fari kontraŭ milito kaj ŝatas uzi komputilon.

Luc Verbeke, La Proliere, F 36500 st Gemme, Francio 21j studento d kor kun gejunuloj.

Alfonso Wosny Ficho, Av. Parana 159/102, BR 86010-370 Londarina – Parnas, Brazilio, 16j lernanto d legi, skribi leterojn, spekti kinon kaj naĝi.

xmxmxmxmxmxmx

xmxmxmxmxmx

xmxmxmxmx

xmxmxmx

xmxmx

xmx

x

Podávání novinových zásilek povoleno
oblastní správou pošt Střetí Čech v Praze
č. P/Piš-2295/92 ze dne 16. XI. 1992

Esperantský klub
CZ 029501 Mnichovo Hradiště